



**Kipro:
proteste
kontraŭ la
„protektantoj”**



**Belgio: nuda vero
pri nova rekordo**

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Eldonjaro: 2005

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 270 paĝoj,

ISBN: 90-77066-18-07; prezo ĉe FEL: 20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 12 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Nuda vero pri nova rekordo

9



Belgio rompis la mondan rekordon pri registaroformado – efektive, neformado. La antaŭan rekordon tenis Irako. La 17an de februaro pasis jam 249 tagoj post balotoj sen nova federacia registaro en Belgio.

La perspektivoj estas neniel esperigaj. La du ĉefaj partioj, kiuj gajnis la balotojn, la flandra dekstra N-VA kaj la valona maldekstra PS, interrilatas kiel akvo kaj fajro kaj grandegas la reciproka malfido.

Verdigu la dezertojn!

17



La homaro eligas tro multe da tiel nomataj varmodomaj gasoj en la atmosferon, precipe karbondioksido (CO₂), per bruligado de karbo, nafto kaj tergaso. Ili minacas trovarmigi la klimaton. Vico da konferencoj ĝis nun ne atingis konkretajn rezoluciojn pri drasta kaj deviga CO₂-ŝparado (vidu la antaŭan numeron). Tekniko ĝi estas farebla, kvankam ĝi postulas abundon da inventoj kaj novigaĵoj.

Rusa vilaĝo

14

Mi jam volis reveturi hejmen, kiam Andreo telefonis al mi, ke lia edzino rompis piedon kaj ke li devas veturigi ŝin en specialan malsanulejon en urbo je 130 kilometroj (por Siberio tio ne estas granda distanco). Li volis, ke mi ilin akompanu. Nu bone, peto de amiko estas leĝo.

Ni ambaŭ kreskis en tiu granda vilaĝo (ĝia loĝantaro estas 9000 homoj). Mi bone konis la vivon ĉi tie antaŭ 25 jaroj kaj nun vidis vivon tute alian. Dum tiu sufiĉe longa veturo mi parolos kun Andreo pri la novaĵoj. Mi ilin vidas, sed ne komprenas.

politiko

KOMENTARIO	8
Embargo la embargon!	
AŬSTRIO	8
Punkto – sed ne tute fino	
BELGIO	9
Nuda vero pri nova rekordo	
KOSOVO	9
Novaj elektoj, nova parlamento	
KIPRO	10
Proteste kontraŭ la „protektantoj”	
ALBANIO	10
Ĉu anĝelo aŭ diablo?	

moderna vivo

KANTADO	11
Konkurso videble „not”inda	
ŜOFORADO	12
Memorigilo aŭto-mata	
ALBANIO	12
Pri la censo maljusta senso	
JUSTECO	13
Kial la kolero?	
MEDIO-PROTEKTADO	13
Spertoj vespertaj	

ekonomio

ESEO	14
Rusa vilaĝo	

turismo

FINNLANDO	16
Ĝui la silenton	

medio

KLIMATOVARMIGO	17
Verdigu la dezertojn!	

libroj

Ho, belaj spritaj tempoj!	20
Vagadoj urbaj kaj mensaj	21
Desegnu por mi ŝafeton	22
REAGO	23
Senmita biografio de Zamenhof	

novelo

Labirinto en ĉina loĝkvartalo	24
-------------------------------------	----

arto

TURNER-PREMIO	26
Skulptaĵoj kantataj	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakte al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be.
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Bosnio-Herc.	BAM	50	55	30	11	18
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Grekio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalia	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albuera Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstro:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: aon.913548977@aon.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Bosnia kaj hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698. Reto: info@esperanto.ba.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
- > **Francja:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
 - > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 - > **Hungara:** AbonaSoft Bt, HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
 - > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
 - > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 - > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: fesp.it@infinito.it.
 - > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
 - > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
 - > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Reto: esperanto@saluton.net.
 - > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 606-1250,

- Escáz. Reto: miaumiau@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City 0630. Reto: gddewar@ihug.co.nz
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljković 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.rs.
 - > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11, SK-3601 Martin. Reto: marcek@esperanto.sk.
 - > **Slovenaj:**
 - > Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
 - > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
 - > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Kvalito



Mia pasintmonata enkonduko estis iom pesimisma. Efektive, estas malagrabla rimarki, ke abonanto eksiĝas, ĉar li trovas en MONATO ideojn ne kongruajn kun siaj. Sed feliĉe nian revuon atingas ankaŭ laŭdoj fojfoje! Jen la vortoj de István Ertl, kiujn li publikigis en la *Facebook*-paĝo de MONATO:

„Mi havis okazon eklegi la februaran MONATON. Nu, antaŭ ol mi rimarkis kion mi faras, mi eĉ finlegis ĝin, komplete kaj senmanke, plene kaj ilustrite. Kia surprizo ... tiaĵo ne plu okazis al mi de longaj jaroj. Ĉi tiu numero konsistas preskaŭ ekskluzive el tia materialo por kia MONATO estis fondita: temoj netroveblaj en la ordinara gazetaro, vidpunktoj ne ĉiam atenditaj, pritrakto elinterna ĉar samlandula al la temo ... Eĉ la lingvaĵo estis trae kaj trae senmakula! Gratulon.”

Kiel respondeculo de la magazi-

no ni povus nun ĝoje ekrideti (tion ni faras ja!), sed krome necesas pripensi, kiel ni povas konservi, kaj eble eĉ ankoraŭ plialtigi, tiun kvaliton. Nia nova ĉefredaktoro Paul Gubbins jam intencas verki iujn gvidliniojn pri verkado por MONATO, kaj ankaŭ ekzistas planoj proponi al la publiko en la venonta Universala Kongreso seminarion por kuraĝigi kaj helpi verkemulojn. Pliajn detalojn vi baldaŭ legos ĉi-loke.

Tamen ankaŭ vi povas kaj kapablas kuraĝigi niajn korespondantojn. Ĉu vi legis en MONATO ion, kion vi tre ŝatis? Ne hezitu skribi tion al ni! Viaj laŭdaj vortoj spronos la kunlaborantojn liveri pli da altkvalita materialo por nia revuo!

Sincere via

Paŭl Peeraerts



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

sociaj retejoj:

- Twitter: @FEL_Antverpeno
- Facebook: <http://eo-eo.facebook.com/revuo.Monato>
- Ipernity: http://flandra_esperanto-ligo.ipernity.com

ĉefredaktoro:

Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Rob Moerbeek, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Shlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
 - **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
 - **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
 - **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
 - **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
 - **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: libroj@monato.net.
- Noto: Librocenzoroj oni ne sendu al la redaktoro propraj iniciatoj. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Andy Peetermans, Schaliehoevestraat 23, B-2220 Heist-op-den-Berg. Rete: lingvo@monato.net.
 - **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: medio@monato.net.

- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Dilma Rousseff lulita

Mi bonorde ricevis la januaran numeron de MONATO, kiu montras nian prezidantinon Dilma Rousseff surkovrile kaj enhavas la bonege ellaboritan raporton Lulita de la antaŭulo. Gratulon!

Ivan COLLING
Brazilo

Dilma Rousseff lulita (2)

La kovrilo de la januara numero de MONATO trioble tristigis min per la unua vorto de sia lasta linio: „lulita de la antaŭulo”.

Unue, mi profunde malĝojas pro tio, ke la sola participo de tiu paĝo estis miselektita kaj tute ne diras tion, kion la verkanto supozis esti diranta.

Due, mi plej bedaŭras, ke la redaktoro simple neglektis la klaran vortoludon, kiun proponis al li la nomo de la lulanto per unu el la tieaj frazoj de la fino de la unua kolumno de paĝo 10 (mia aldono per kursivaj literoj): „Tiel finiĝas la erao Lula *kaj lula*”.

Kaj fine, mi konsternas lamentas, ke la reviziantoj pretervidis tian mislekton de participo pro la graveco de

la revuo en nia movado, sed precipe pro ties lokaperigo.

Mia unua kritiko celas kontraŭbatali la tragedian miskomprenon de la sencoj de niaj participoj, kiujn tre multaj egaligas al adjektivaj frazoj. Tia miskutimo certe estas malantaŭ la nun traktata participo: Dilma Rousseff, kiun lulis ŝia antaŭulo. Plej evidente, ĝis la 31a de decembro 2010 ŝin lulis Lula, sed nian prezidanton Dilma ekde la 1a de januaro 2011 neniu rajtis luli ...

Nur ekde tiu tago ŝi estis lulita de Lula. Kaj tion la verkinto konfirmas per la unua frazo de sia lasta alineo: „Siavice Lula promesis ne ŝovi la barbon en la novan administracion.”

Geraldo SANTOS
Brazilo

Propravola fraŭlineco

Rilate la artikolon de Xu Jinming (MONATO 2011/2, p. 17) mi deziras rimarkigi, ke kleraj virinoj estas kutime ekonomie sendependaj kaj propravole elektas fraŭlinecon. Edzo kaj infanoj kunportus laborŝarĝon kaj emociajn skuojn, mankon de propra tem-

po kaj limigon de decidoj, hobiaj kaj amuziĝo. Almenaŭ en okcidentaj landoj edzineco/edzeco ofte estas evitata pro minaco de malsukcesoj, divorcoj. Eĉ havi infanon eblas sen edzo, kaj tio ne plu estas honto, sed tamen miaopinie maljusta por la naskoto.

Raita PYHÄLÄ
Finnlando

Izolitaj kaj damaĝitaj

Bardhyl Selimi en sia artikolo *Ŝtato plej izolita* (MONATO 2011/2, p. 9) parte rememoras, kion ni perdis pro la rompado de Jugoslavio. Ĉiuj popoloj kaj naciaj malplimultoj de eksa Jugoslavio estas en grandega malgajno, pro suferado de homoj kaj materiaj damaĝoj pro dispecetigo en „bananajn” ŝtatojn.

Oni sciis, ke perfortaj dispecetigoj estas tre damaĝaj por ĉiuj, sed iuj fortoj tamen ekmovis al rompado kaj sukcesis. La historio klarigos la faritan damaĝon. Al ni restas kun bedaŭro memori, kion ni ĉiuj perdis pro la rompado de Jugoslavio.

Atanasije MARIJANOVIĆ
Serbio



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,25 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **24,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **49 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de Monato, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe monato@fel.esperanto.be.



La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la retaj versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

La mankanta j ...

Paul GUBBINS

Toleremaj kaj komprenemaj estas, ĝenerale, esperantistoj. Toleremo kaj komprenemo apartenas al esperantisteco kiel – almenaŭ en mia lando – lakto al teo. Klare, nia eta verda mondo ne povas eviti kverelojn, disputojn, malamojn kaj aliajn situaciojn, en kiuj iom da toleremo kaj komprenemo estus bonvenaj. Tamen se ni ne kverelus, disputus, malamus, ni ne estus homoj ... kaj Esperanto ekzistus en sfero neiel reala, ĉiel artefarita.

Tamen rilate nian lingvon foje nia toleremo, kaj aparte nia komprenemo, forestas. Imagu: vi sidas en via ŝatata fotelo, aŭ antaŭ la ekrano de via komputilo, legante la plejlastan numeron de MONATO, kaj subite frapas vin la frazero „... al mia gepatroj”. Ŝokite, horigite, vi eksaltas, kriante: „Peketo! Mi nepre atentigu la redakcion!”

Nu, mi elkore dankas, ke akcipientro-okula leganto rimarkis ĝuste ĉi tiun malglataĵon en antaŭa *El mia vidpunkto*. Jes, via ĉefredaktoro pekis kontraŭ la pluralo (kaj nun pentas, lernante parkere la „Fundamento” – aŭ ĉu „Fundamenton”, aŭ eĉ „Fundamento-n”? ... dankon, doktoro Z, pro via laŭdire facila lingvo).

Honto

La atentigo ebligis elsarki la mison el la papera versio de MONATO kaj tiel kaŝi la honton de via ĉefredaktoro. Kaj, verdire, jen io lernenda por ĉiuj MONATO-kunlaborantoj: nek aŭtoro, nek revizianto, nek redakcianoj, rimarkis la mankantan literon, kio signifas, ke ni ĉiuj eĉ pli rigore verku, legu, kontrolu.

Sed, momenton. Pri unusola mankanta litero temas: ĉu la reago de la leganto, kiu avertis la redakcion en Antverpeno, kiu avertis min, ne ĉiun

ekvilibron perdas? Unusola litero, diale. Ĉu, se tiaĵon en nacilingva gazeto vi trovus, vi mesaĝus al la redakcio? Eble vi jes. Mi tamen tutcerte ne.

Komo

En la sama semajno, kiam oni konsciigis min pri la mankanta *j*, mi pli zorge ol kutime legis mian ĉiusemajnan regionan gazeton. En ĝi mi trovis, sen multe da peno, belan kolekton da misoj: ekz. – mi citas proksimume – „klasa”, anst. „klasika”; „metro”, anst. „metroo”; „stalo”, anst. „stilo”, ktp. Kaj, se mi ricevus eŭron kontraŭ ĉiu petolema komo, mi baldaŭ fariĝus riĉulo.

Kiom da plendoj en la sekva numero de la gazeto? Kiom da pardonpetoj de ruĝvangaj ĵurnalistoj? Neniom ... kio min pensigis. Kial esperantistoj volonte atentigas pri malglataĵoj, dum almenaŭ anglalingvanoj ilin aŭ ignoras aŭ eĉ priridas? La nacia gazeto brita *Guardian* konatiĝis kiel *Grauniad*

pro la oftaj mistajpaĵoj, kiuj iam buntigis ĝiajn paĝojn: britoj amuziĝis, sed esperantistoj ...?

Tavolo

Certe, Esperanto ŝajnas pli kara al difinita tavolo de esperantistoj ol verŝajne la angla al ekvalenta nacilingva tavolo. Sendube tiuj ne senhariĝus pro mankanta *j*, sed jes leterus pri pli subtilaj, pli tiklaj lingvaj punktoj.

Ke Esperanto bezonas pli da defendo kaj protekto ol ekzemple mia gepatra lingvo, la angla, mi komprenas. Krome mi ĝojas, ke ni esperantistoj ŝajne pli aktive fieras pri nia lingvo, ol multaj nacilingvanoj pri siaj. Eble, se esperantistoj ekenus pri la detaloj de la lingvo – eĉ mankanta *j*, pretervidata sendube dum frazo-fajlado – Esperanto riskus fariĝi tiel maleleganta, tiel stumbliga kiel multaj naciaj lingvoj. Do daŭre, mi petas, atentigu pri lingvaj peketoj.

Tamen ne silentiĝas insista voĉeto, kiu malice flustras, ke Esperanton ni ne povos konsideri vere matura, vere alveninta, vere akceptita, ĝis ni estos same malstreĉitaj pri Esperanto kiel pri niaj naciaj lingvoj. Ĝis, alivorte, ni ne plu postĉasos erarvagaĵojn *j*-ojn. Ĝis ni permesos al nia lingvo, kaj al ĝiaj uzantoj, iom spiri. Eĉ, foje, mislitero. ■



Ankaŭ la nacia gazetaro prezentas belan kolekton da misoj.

Embargu la embargon!



Antaŭ nelonge – kadre de leterado de mondfederistoj nederlandaj, apoge al la monda jura ordo – mi skribis al landaj parlamentanoj pri la embargo kontraŭ Kubo.

Ĝusaj spertoj en la antaŭa kongreslando konvinkis min pri la vaneco kaj la malhomaj efikoj de la embargo. Jam en 1990 ni eksciis, ke sapsurogato el oranĝoj afekcias la haŭton, ĉefe de infanoj, kaj ke homoj sen usonaj parencoj malhavas farbon por kovri la lignon kontraŭ tropikaj pluvegoj. Dume la registaro firme sidas.

Malliberuloj

La kuba registaro ja faris pozitivajn paŝojn: liberiĝis politikaj malliberuloj ĝuste en la kongresa periodo. Ni konsciu, tamen, ke vera demokratio estas lukso kaj eblas nur ĉe iu nivelo de ekonomia prospero. Kiel do Kubo, malgraŭ la klereco de multaj civitanoj, atingos demokration, plagate de la embargo?

Nederlando ja laŭ sia konstitucio devas servi al la internacia jura ordo. Sed ankaŭ en aliaj landoj de la „civilizita mondo” oni pledu por aboli malefikajn kaj malhumanajn embargon, datiĝantan de antaŭ preskaŭ duonjarcento.

Rob MOERBEEK

Punkto – sed ne tute fino

Ekde julio 2011 en Aŭstrio validos novaj reguloj por enmigrantoj el landoj, kiuj ne membras en Eŭropa Unio. La aŭstra registaro decidis enkonduki por ili specialan karton. Ĝi estas nomata ruĝa-blanka-ruĝa karto, lige kun la koloroj de la aŭstra nacia flago.

Laŭ la nova sistemo, enmigrado okazos laŭ difinitaj kriterioj kaj ne kiel ĝis nun laŭ kvotoj. Maria Fekter, la ministro pri internaj aferoj, kiu anoncis la novajn regulojn, diris: „La ĝisnuna nefleksebla kvotsistemo, kiu ne konsideris kvalifikon, estos forigita.”

Ricevintoj de la karto rajtos resti kaj labori. La karto estos distribuata laŭ punkta sistemo. La kriterioj, kiujn la enmigrantoj devos plenumi por atingi difinitan nombron de punktoj, estas profesia kvalifiko, grado de klereco, lingvoscioj kaj aĝo.

Strukturo

Per la novaj reguloj enmigrado en Aŭstrion ricevos novan strukturon. Por la t.n. RBR-karto povos kandidati anoj de tri grupoj: altkvalifikitaj enmigrantoj (manaĝeroj, medicinistoj, fakuloj pri informaj teknologioj), kvalifikitaj profesiuloj, kiuj ne sufiĉas en la lando (flegistoj, frizistoj k.a. laŭbezone fiksotaj) kaj ceteraj laboruloj, kiujn oni ne povas trovi inter laborerĉantoj.

Nun enmigras Aŭstrion averaĝe 35 000 personoj jare. Triono venas el ne-EU-landoj. Rezulte de la nova sistemo venos ĉirkaŭ 8000 homoj jare. Oni atendas, ke ĝis 2030 en Aŭstrion enmigros entute 100 000 personoj.

Evgeni GEORGIEV



Maria Fekter, la ministro pri internaj aferoj, kiu enkondukas la novan enmigranto-karton..



La nova RBR-karto, kies koloroj spegulas tiujn de la nacia flago de Aŭstrio.

La Deklingva manlibro pri politiko de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono.

Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio,

butiko@fel.esperanto.be aŭ www.retbutiko.net kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.

Nuda vero pri nova rekordo



Malgraŭ la tiel nomata registara krizo, ministro pri financoj Didier Reynders preparas novan buĝeton kaj eĉ realigas ŝparojn.

Belgio rompis la mondan rekordon pri registaroformado – efektive, neformado. La antaŭan rekordon tenis Irako. La 17an de februaro pasis jam 249 tagoj post balotoj sen nova federacia registaro en Belgio.

La perspektivoj estas neniel esperigaj. La du ĉefaj partioj, kiuj gajnis la balotojn, la flandra dekstra N-VA kaj la valona maldekstra PS, interrilatas kiel akvo kaj fajro kaj grandegas la reciproka malfido.

Dum en najbaraj landoj kreskas zorgoj pri ŝajne senelira situacio, belgioj,

precipe studentoj, iniciatis festojn en Antverpeno, Lovenjo, Louvain-la-Neuve, Bruselo kaj en Gento (urboj kun universitato) por festi la rekordon. En Gento grupo da junuloj eĉ duonnudigis sin por montri, ke ili hontas, dum ili tamen ŝajne bonege amuziĝis (vidu kovrilfotojn).

Ŝparoj

Montriĝis, ke belgioj ĝenerale ne faras al si multe da zorgoj pri la situacio. La ekonomio, post la tutmonda krizo, nun denove ekkreskas. La eksa registaro, kontraŭe al sia rolo, sed pro eŭropunia

devigo, tamen preparas novan buĝeton por la jaro 2011 kaj eĉ realigas ŝparojn.

Pro la federacia strukturo, Belgio havas ses registarojn. Nur la federacia registaro mankas, dum la kvin aliaj ankoraŭ funkcias kaj povas preni decidojn laŭ siaj povoj. Tamen, tro longa manko de registaro povus provoki financerkatojn „atakon” kaj tiam, pro granda eksterlanda ŝuldo, Belgio rapide povus malriĉiĝi.

Ivo DURWAELE

Novaj elektoj, nova parlamento

Post pli ol du monatoj ekde la ĝeneralaj balotoj (ripetiĝis la balotoj en diversaj lokoj) kunvenis la nova parlamento de Kosovo, en kiu kunsidas multaj junaĝaj deputitoj el ĉiuj partioj. Tamen la reganta koalicio, estrata de PDK (Demokratia Partio de Kosovo), alfrontas la opozicion de la forta *Vetëvendosje* (Memdecido).

Dum la unua sesio la 21an de februaro oni elektis denove la parlamentestron Jakup Krasniqi el PDK kaj kvin vicestrojn el diversaj partioj. Kiel

antaŭe, la registaron estros Hashim Thaçi [haŝim taĉi] kun la vicestro Ukë Rugova, filo de la forpasinta prezidanto Ibrahim Rugova.

Kiel prezidanto estis elektita Behgjet Pacolli [bedĵet pacoli]. Li estas la plej riĉa albano en la mondo. Lia konstrukompanio, fondita en Svislando, aktivas eĉ en Rusio.

La prezidanto favoras malfermi Kosovon al la cetera mondo, inkluzive de Serbio.

Bardhyl SELIMI



Behgjet Pacolli, la plej riĉa albano en la mondo, fariĝis prezidanto de Kosovo.



**Artikolojn pri la politiko
en via regiono sendu al
politiko@monato.net.**

KIPRO

Proteste kontraŭ la „protektantoj”

Multe da bruo kaŭzis en Kipro surstrataj protestoj de 30 000 turkaj kipranoj kontraŭ Turkio, kiu ekde 1974 regas la nordon de la insulo. La manifestaciantoj, kiuj inkluzivis multajn instruistojn, kulpigis Turkion pri la ekonomia krizo en la nordo.

La turka ĉefministro Erdoğan ek-koleris, kiam fine de januaro parto de la manifestaciantoj flirtigis flagojn de la kipro respubliko. Li difinis la turkajn kipranojn sendankaj, memorigante, ke dum tiom da jaroj Turkio „satigas” kaj „protektas” ilin.

Samtempe li petis, ke la kulpuloj estu arestitaj kaj ke la tumultoj senpro-

kraste ĉesu. Li taksis la eventojn politika memmortigo, kiuj internacie ridindigas Turkion. Al la estro de la sindikato de turk-kipraj instruistoj, Şener Erçil, kiu deklaris sin preta „kvereli”, Erdoğan diris, ke Turkio ne atendigos sian reagon, se tia sinteno kontraŭ lia registaro pludaŭros.

Malkonkordo

Laŭ la turk-kipra gazeto *Kıbrıs*, la lokuloj mem faris tion, kion la sudo (t.e. la grek-kipra registaro kaj la kipro ortodoksa eklezio) ankoraŭ ne sukcesis fari: semi malkonkordon inter turkoj kaj tur-

kaj kipranoj.

La grek-kipra deputito de la Eŭropa Parlamento, Eleni Theocharous, rimarkis, ke 30 000 manifestaciantoj en la norda Kipro egalas proporcie al 20 milionoj da egiptoj en la placo Tahrir de Kairo. Ŝi altiris la atenton de EU al tio, kio okazis en la eta mez-orienta lando, kaj aparte al la konduto de Turkio, kiu ne aparte konvenas al EU-kandidato.

Laŭ Theocharous, EU subtenu tiujn, kiuj sen perforto protestas kaj kiuj – kontraste al turkoj – estas jam de 2004 konsiderataj, kune kun grekaj kipranoj, eŭropaj civitanoj.

Roberto PIGRO

ALBANIO

Ĉu anĝelo aŭ diablo?



Ilir Meta

Eksministro pri ekonomio, Dritan Prifti, el la reganta koalicio, akuzis sian partiestron, kaj vicĉefministron, Ilir Meta, pri koruptado.

Tion li faris per filmita konversacio en sia oficejo, kiam Meta petis lin favori iun firmaon kontraŭ rekompenco de 700 000 eŭroj.

Tuj reagis Meta, dirante, ke la filmo estas falsaĵo. Li eĉ elposteniĝis, rezignante pri sia deputita imuneco, por ke la prokuratorejo libere enketu. Ĉi-lastata petis helpo de usona fakulo por analizi la filmon.

Disko

La fakulo konstatis, interalie, ke en la disko enestis alia, forviŝita filmo farita de Prifti pri alia konversacio kun Meta, kiam li mem petas favori iun firmaon kontraŭ 700 000 eŭroj.

Tiam la prokuratorejo petis la parlamentestron nuligi la imunecon de ambaŭ eksuloj. La skandalo estis forte ekspluatata de socialistoj dum perfortaj sangaj manifestacioj en januaro kaj poste. Albanoj nun atendas la rezultojn de la esploroj por ekscii, kiu anĝelas kaj kiu diablas.

Bardhyl SELIMI

KANTADO

Konkurso videble „not”inda

Paco, frateco. Du bazaj ingrediencoj por estonta socio, kiu estos – oni esperas – pli justa ol la nuna. Du idealoj, kiuj tre bone karakterizas dum pli ol duonjarcento internacian festivalon pri kanzonoj por infanoj, kies itallingva nomo estas *Zecchino d'oro* [dzeĉino], ora zekino.

Organizata ĉiun novembron en la itala urbo Bolonjo de la bonfara institucio Antoniano, fondita en 1953 de kvar katolikaj monaĥoj, tiu kermeso estas dissendata eŭrovizie de la ŝtata televidkanalo *Rai Uno*.

Kulturheredaĵo

Ĉu kanto-festivalo kiel multaj aliaj? Absolute ne. Fakte ĝi estas la sola televida elsendo rekonata de Unesko – apud centoj da monumentoj kaj urboj – kiel monda kulturheredaĵo. Atendas ĝin jaron post jaro milionoj da infanoj kaj

gepatroj, kaj dum kelkaj tagoj haltas la kutimaj posttagmezaj elsendoj.

Partoprenas tiun muzikan eventon infanaj kanzonoj devenantaj kaj el Italio kaj el eksterlando. Nur ok el la proksimume 300 kantoj, kiuj alvenis en marto al la sidejo de Antoniano, sukcesis trapasi la ĉi-jaran selekton.

Spektantaro

Konkursojaĵoj el ekster Italio – en 2010 el Japanio, Pollando, Filipinoj kaj Azerbajĝano – estas nur parte kantataj en la devenlanda lingvo. Plejparte ili estas tradukitaj italen, por ke la spektantaro povu kompreni.

Kutime la kanzonoj estas amuzaj kaj malseriozaj, kun gaja melodio kaj sprita teksto. Tamen neniam mankas kantoj, kiuj alfrontas problemojn pli profundajn: minoritatanan laboron, rasismon, perforton.



EBE 36

Pro miskomprenoj kaj, ŝajne, ekonomiaj kialoj, oni sendanke forigis el la festivalo la amegatan pupon Topo Gigio.

La kermeso daŭras preskaŭ semajnon. Ĉiun posttagmezon la kantistoj, elektitaj dum alia konkurso tra la tuta Italio kaj eksterlande, prezentas sian pecon, akompanate de la ĥoro de Antoniano. Voĉdonojn ili ricevas ne nur de la enstudia publiko, sed ankaŭ de la televidaj spektantoj, pere de telefona voĉdonado.

Muso parolanta

La elsendo estis dum longa periodo ligita al sinjorino Mariele Ventre, kiu dum jardekoj estris la koruson. Aliaj simboloj de la festivalo estis ĝia fondinto, Cino Tortorella, alinome Mago Zurli, pro siaj iamaj magiaĵoj, kaj la amegata pupo Topo Gigio (muso parolanta, konata ankaŭ en hispanlingvaj landoj). Ilin tamen, en la lastaj jaroj, pro miskomprenoj kaj, ŝajne, ekonomiaj kialoj, oni sendanke forigis el la festivalo.

La konkurso en 2010 finiĝis per nekutima duobla triumfo: du kanzonoj, dediĉitaj respektive al laborema kamparano kaj al lerta ĉiofara patro, atingis precize la saman poentaron.

Indas menciigi, ke ĉiujn enspezojn (ekzemple de la vendado de diskoj) ricevas bonfaraj organizaĵoj, kaj ke la finan premion – oran zekinon – oni aljuĝas ne al kantisto sed al la aŭtoro kaj komponisto de la venkinta kanzono.

Roberto PIGRO



LABIBBIO/ORNOCOTTE/RAI.IT

Fakte la konkurso estas la sola televida elsendo rekonata de Unesko – apud centoj da monumentoj kaj urboj – kiel monda kulturheredaĵo.

ŜOFORADO

Memorigilo aŭto-mata



Apudŝosea monumento memorigas pri trafika sekureco.



Ornamas litovan ŝoseon monumento kreita per tri damaĝitaj aŭtomobiloj. Ĝia celo: memorigi la ŝoforojn unue, ke malprudenta stirado povas subite kaj draste ŝanĝi la vivon, kaj due, ke ĝentileco kaj singardemo survojaj neniom kostas kaj povas savi la vivon.

La monumento memorigas ankaŭ pri tiuj, kiuj pereis pro aŭto-akcidentoj. Es-tis periodo, kiam Litovio laŭ akcidentoj okupis la unuan lokon en Eŭropo. Nun ĝi okupas la duan lokon. La nombro de viktimoj falis lastatempe je pli ol 26 %, pli bone ol en Danlando (25 %) aŭ Estonio (24 %).

En 2010 denove falis la nombro de akcidentoj je 3,7 % kaj la nombro de pereintoj je 19,4 % kompare kun la sama periodo en la antaŭa jaro. La ĉefaj akci-dento-tagoj en Litovio estas vendredo, sabato kaj lundo.

LAST

ALBANIO

Pri la censo maljusta senso

Baldaŭ ankaŭ en Albanio oni okazigos censon de la loĝantaro, konforme al la direktivoj de Eŭropa Unio. Tiamaniere civitanoj respon-dos demandojn ankaŭ pri religio kaj nacieco.

Religio estas senproblema por alba-noj: dum jarcentoj ekzistis interreligia harmonio. Sed nacieco por la relative ĝis nun homogena albana ŝtato (laŭ antaŭaj censoj pli ol 95 % estas albanetnuloj) povas fariĝi tikla.

La problemo kuŝas en tio, ke najbara

Grekio, ekzemple, faras sian plejeb-lon dum 20 jaroj por helenigi albanojn tien elmigrantajn pro laboro (ĉ. 800 000 ho-mojn) aŭ albanojn loĝantajn sude de la landlimo. Grekio certigis al ili monatajn pensiojn je valoro de 400 eŭroj: pensioj en Albanio mem apenaŭ atingas 100 eŭrojn.

Konsulo

Multaj albanoj estas devigitaj pro laboro eĉ ŝanĝi siajn nomojn aŭ sin de-

klari grekaj (laŭ devizo greka: ĉiu orto-doksulo estas greka). Tio okazis antaŭ nelonge en la sud-orienta urbo Korĉa [korĉa], kiam la tiea greka konsulo al-vokis senskrupule al ĉiuj grekemuloj sin deklari grekaj.

Tio estigis fortajn enlandajn prote-tojn, kvankam la greka registaro propo-nis, ke oni traktu la deklaron de la kon-sulo simple kiel lian propran kaj neofici-alan opinion.

Bardhyl SELIMI

Kial la kolero?

Murdita en januaro en Pornic, Francio, estis junulino nomita Laëticia. Pri la krimo respondecis recidivulo. Laŭ la franca prezidanto, Nicolas Sarkozy, „homoj” estu punataj: la „homoj” estas la juĝistoj kaj tiuj, kiuj prizorgas krimulojn liberigitajn. Malakcepteblas, diris la prezidanto, ke viro konata al la justico denove murdas.

Sarkozy forgesis, ke la situacio ne estas nova. Tiuj „homoj” helpas eksajn malliberulojn trovi laboron aŭ loĝejon; ili helpas al aliaj, kondamnitaj al puno kun prokrasto, alkonformiĝi al la postuloj de la tribunalo, ĉar, okaze de malobeo, la kondamnitito reiros malliberejen.

La problemo kuŝas en tio, ke la specialaj juĝistoj kaj la aliaj fakuloj, kiuj prizorgas malliberulojn, respondecas

ĉiuj pri po inter 140 kaj 180 dosieroj. Ili devus havi maksimume 80.

Striki

La justic-oficistoj do ekkoleris, ne povante akcepti la vortojn de la prezidanto. Ili decidis striki, sed ili ne rajtas (kvankam en Francio rajtas striki soldatoj aŭ policistoj). Verdire la situacio ekzemplas gravajn problemojn en la franca justico. Mankas sufiĉe da justic-oficistoj, ŝtat-oficistoj kaj ankaŭ mono.

La sindikatoj avertis la parlamenton pri la mankoj, kiuj signifas, ke rilate justico-buĝeton Francio sidas en Eŭropo en la 37a loko el 40. Kulpas Sarkozy, kiu antaŭ kvar jaroj forigis financajn kaj stabanajn rimedojn.

Certe nenio povis eviti la murdon

de Laëticia. La juĝistoj simple aplikas la francan leĝon. Krimulo kondamnita al 10-jara enkarcerigo ĝenerale estas elprizonigata post ses jaroj. La problemo estas, ke necesas adapti la punan respondon laŭ la personeco de la deliktinto.

Kaŝi

La murdo de la junulino estas hontinde kaj malinde ekspluatata de la prezidanto kaj liaj ministroj por kaŝi la malsukceson de ilia sekureca politiko. Envere kulpas la prezidanto, kiu kreis pli da dosieroj kaj malpli da homoj por ilin pritrakti, plus multe da novaj leĝoj.

Notindas, ke unuafoje viktimo-asocioj, advokatoj kaj ankaŭ 65 % de la franca popolo subtenas la koleran reagon de la justic-oficistoj.

Astrid MILLET

MEDIO-PROTEKTADO

Spertoj vespertaj

Alproksimiĝas la somero kaj – kiel okazas jam de dudeko da jaroj – prezentiĝas denove en pluraj italaj regionoj timigilo nomata „tigro-moskito”.

Rimedo, pli-malpli multekostaj, kontraŭ ties ĝenaj pikoj tute ne mankas, sed orientiĝi laŭ la merkato por elekti la plej efikajn ofte malfacilas. Tamen ekologian kaj relative malmultekostan metodon alprenis lastatempe diversaj italaj urboj, inter tiuj la komunumo de Udine, en nord-orienta Italio.

Frandemaj

Tie, por purigi kaj plejeble multe

„blend” la urbon kontraŭ moskitoj kaj kolegaro simila, oni decidis „dungi” pipistrelojn. Ili estas tiel frandemaj pri insektoj, ke ili kapablas manĝi tage 500 - 5000, laŭ ties grandeco.

Tial en la kvartaloj de Udine, proksime de altaj arboj kaj akvoŭfluaĵoj, oni instalas inter januaro kaj februaro 44 „dometojn” rezervitajn al vespertoj.

La nestoj – kune kun tradicia sango de kloakoj kaj de aliaj riskaj lokoj fare de la komunumo (nelaste de la du urbaj mortintejoj) – garantios someron verŝajne pli malstreĉan al urbo aparte kutimiĝinta, pro humida klimato, al la tigro-moskito.



La urbo Udine decidis „dungi” pipistrelojn por manĝi la moskitojn.

Patroloj

Certe, por ekstermi tiun insekton, la pipistreloj ne povos ripozi sur siaj laŭroj. Estas konate, ke la tigro-moskito aktivas nur tage, dum vespertaj patroloj ne komenciĝas antaŭ malheliĝo. Iel ajn, la projekto ebligas malpliigi ankaŭ la nombron de ordinara moskitoj kaj aliaj insektoj. Udine, eleganta urbo kun preskaŭ 100 000 loĝantoj, elspezas 77 000 eŭrojn pro la projekto. Multaj aliaj komunumoj, eĉ eksterlandaj, pripensu solvon tian. Laŭ la ekzemplo de Udine, eblus miniumigi la uzon de insekticidoj kaj aliaj substancoj toksaj aŭ poluaj.

Roberto PIGRO

Rusa vilaĝo

Pasintsomere mi ripozis en la vilaĝo, kie mi pasigis mian infanecon; tia ripozo estas tradicia en Rusio. Plej ofte mi renkontiĝis kun mia lernejamiko Andreo. Li estas unu el nemultaj, kun kiuj konserviĝis animaj rilatoj.

Mi jam volis reveturi hejmen, kiam Andreo telefonis al mi, ke lia edzino rompis piedon kaj ke li devas veturigi ŝin en specialan malsanulejon en urbo je 130 kilometroj (por Siberio tio ne estas granda distanco). Li volis, ke mi ilin akompanu. Nu bone, peto de amiko estas leĝo.

Ni ambaŭ kreskis en tiu granda vilaĝo (ĝia loĝantaro estas 9000 homoj). Mi bone konis la vivon ĉi tie antaŭ 25 jaroj kaj nun vidis vivon tute alian. Dum tiu sufiĉe longa veturo mi parolos kun Andreo pri la novaĵoj. Mi ilin vidas, sed ne komprenas.

Ĝis la urbo ni veturis preskaŭ silente. Kun la malsana edzino, kiaj konversacioj eblas? Sed kiam ni veturis reen, ni ne povis plu silenti. Andreo volis multon rakonti al mi, kaj nia konversacio estis neordinare vigla.

– Andreo, kiam ni veturis en la urbon, dum 130 kilometroj ni ne vidis eĉ unu brutaron. Diable, tiom da herbo, ĝis la genuoj! Dum nia infaneco ĉi tie estis tiom da brutoj, ke paŝtejoj iĝis senherbaj. Paŝtistoj pelis brutaron multajn kilometrojn por trovi ian lokon por paŝtado.

Andreo malgaje ridetis:

– Forgesu pri tio ... Vi delonge vivas en urbo kaj nenion scias pri niaj nunaj cirkonstancoj. Vi ne vidis iujn gregojn survoje en la urbon, jes, plej verŝajne vi ne vidos ilin ankaŭ reen. Gregoj malaperis. Vi jam dum 25 jaroj ne observis la vilaĝan vivon. Multaj en vilaĝo, se ne

ĉiuj, volus havi kontentigan brutaron aŭ same kontentigan parcelon da tero, esti terkulturistoj. Sed se homo dum socialismo ricevadis nur modestan laborpagon, de kie li prenos rimedojn por tio?

– Nu, jen en urboj homo, kiu volas komenci propran aferon, prenas en banko kredito ...

– Urbo estas alia aĵo. Kian aferon komencas urbano? Bieran kioskon aŭ riparejon de ŝuoj. Duonmiliono da rubloj (12 500 eŭroj) da kredito, miaopinie, sufiĉos. Sed mi kalkulis por mia intencata farmo. Ekzemple, mia domo valoras maksimume unu milionon da rubloj. Se mi hipotekos en banko la domon kaj

ĉion, kion mi havas, pli ol milionon ili al mi ne donos. Sed tio por mi estas guto. Por kulturi brutojn aŭ grenon, mi bezonus almenaŭ kvin milionojn: mi devus aĉeti, ni diru, 20 hektarojn da tero. Mi ne nur per fosilo povas labori, tekniko estas bezonata, semoj, sterko, brulaĵoj, grenejo, remizo, rezervaj maŝinpartoj. Tio estas ja ne biervendado.

– Jes, ne biervendado ... La ŝtato ja devus helpi al la agrikulturo fariĝi laborkapabla.

– Ĉu vi opinias? Mi ne. En Ruslando nun neniu devas ion al iu. Mi ne kredas je influo de planedoj, steloj, stelfiguroj al la homaro; ĉio ĉi estas idiotaĵo. Sed tamen estas en la kolektiva psikologio iaj cikloj. Rememoru la mezepokon. Dum multaj jarcentoj regis sovaĝeco, kaj nur dum Renesanco reviviĝis humanismo.

Andreo nervoze komutis la transmision.

– Nun Ruslando estas same tia sovaĝa mezepoka lando. Vi diras: la ŝtato. Sed kiu estas la ŝtato? Amaso de malbenitaj burokratoj. Ĉu ili bezonas la agrikulturon? Por kiu diablo? Ili sen ĝi bonege vivas. Estas nafto, gaso, oni povas ŝteli milionojn kaj miliardojn. La ŝtato ... Formortas la lando. Vi ja vidas: kaj en urbo, kaj en vilaĝo ne estas infanoj. Rememoru, kiom da amikoj ni havis dum lerneaj jaroj. Mi havis tri ge-



ASP PATRICK

fratojn, vi – kvar. Mia nepo alveturis el urbo. Li volis dum la tuta somero ĉe ni vivi, sed apenaŭ unu semajnon eltenis: estas tro enue, ne estas ĉirkaŭe infanoj por ludi.

130 kilometroj estas tamen distanco ne malgranda. Ni renkontis survoje kelkajn vilaĝojn, kvankam en Siberio vilaĝoj lokiĝas ne ofte. Jes, Andreo pravis: vilaĝoj estis, sed gregoj de bovinoj aŭ ŝafoj ĉirkaŭ ili ne vidiĝis.

Sed tamen unu negrandan gregon mi ekvidis. Olda viro paŝtis 15 aŭ 20 ŝafojn.

– Vidu, jen grego. Ĉu oni povas normale vivi, bredante 20 ŝafojn?

– Ne, certe ne. Tio estas nur negrandan aldono al pensio de tiu homo. Por normale vivi, oni devus breedi 200 ŝafojn. Jen imagu, kiajn monrimedojn oni bezonas. Mi al vi ankoraŭ unu interesafon diros: ekzemple tiu oldulo kun du dekoj da ŝafoj bredas ilin nur por viando. Felojn kaj lanon neniuj bezonas.

– Kiel estas tio?

– Tre simple: neniuj bezonas. Kiam oni buĉas ŝafon aŭ bovidon, oni elĵetas felojn al hundoj.

– Ahem ...

Dum iom da tempo ni veturis silente.

– Nu, kiu dum disfalo de la socialismo havis potencon aŭ estis apud la po-

**Tiom da neplugita tero,
tiom da fekundaj paŝtejoj,
oni povus
superŝuti la merkaton
per nutraĵoj,
sed homoj estas almozuloj.**

tenco, li povis amasŝteli kaj nun povas esti agrikulturisto aŭ komercisto. Vi certe komprenas, ke tiaj homoj estas malmultaj, ĉiuj aliaj mizerumas. Sopirige estas ĉion ĉi rigardi. Tiom da neplugita tero, tiom da fekundaj paŝtejoj, oni povus superŝuti la merkaton per nutraĵoj, sed homoj estas almozuloj. Krom viando kaj greno oni povus breedi legomojn, fruktojn ... Vi vidas ja, ke apud ĉiu domo kreskas pomaj, piraj, prunaj arboj, beraj arbustoj. Sed malmulte, nur por si mem. Oni ne havas ja teron kaj teknikon. Mi mem ĉion ĉi bredus, ricevus plenajn kamionojn da legomoj kaj fruktoj sed ... por tio oni bezonas ne 200-300 kvadratajn metrojn da tero, sed almenaŭ kvin ses hektarojn. Kaj per kio mi ĝin aĉetos? Dum la socialismo la salajroj estis pli ol modesta, kaj nun ĝi estas simple ĝisride simbola. Sed multaj miaj senlaboraj knatoj eĉ tion ne havas ...

– Sed kelkaj homoj bonege adaptiĝis eĉ en tiuj kondiĉoj – daŭrigis Andreo. – Unu tiel nomata farmisto, mi lin bone konas, elpensis por si tre simplan farmistan okupon. Li aĉetis kamionon, kaj nun komercas per viando. En la vilaĝo li aĉetas kilogramon kontraŭ 100 rubloj, veturigas en urbon kaj vendas kontraŭ 200 rubloj. Jen la tuta laboro: li ŝargas en la kamionon kaj veturigas en la urbon. Li trovis al si bonegan niĉon. Homoj ja sidas hejme sen laboro, volas almenaŭ negrandan monon ricevi. Ili mem alveturigas al li pretan viandon, li eĉ ne bezonas buĉi bruton, sed vivas plej riĉe en nia strato ...

Kiam ni estis proksime al nia vilaĝo, mi vidis ankoraŭ unu gregon. Sur herbejo paŝtiĝis 13-15 ĉevaloj.

– Ho! – miris mi. – Ĉe vi tie ĉi estas eĉ klubo de rajdado!

Andreo sincere ekridis:

– Ne, tia klubo estos ĉe ni ne baldaŭ. Ĉio estas pli simpla: unu nia bienisto bredas ĉevalojn por viando ...

– Ah, por viando ... – sopiras mi.

Kiam ni alveturis hejmen, Andreo rimarkis, ke lia maljuna patrino estas per io ĉagrenita.

– Ĉu malbonaj novaĵoj, panjo? – demandis li.

– Anatolo venis – respondis la patrino.

Anatolon mi konis; li estas kuzo de Andreo.

– Hodiaŭ li vizitis la laborkontonon. Nenio nova, laboro ne estas. Li venis prunti iom da mono ... Mi donis al li ankoraŭ panon, lardon, tomatojn. Kiel ne doni al parenca homo?

La olda virino malgaje ridetis kaj aldonis:

– Kaj ankoraŭ Teodoro venis.

Ankaŭ tiun Teodoron mi konis. Najbaro de Andreo, ankaŭ senlaborulo, konata al la tuta strato drinkulo.

– Ah, ĉagreno kun tiu Teodoro. Li alportis en sako porkidon kaj volis ŝanĝi je botelo da vodko. Ne havas mi vodkon, – diris mi al li. – Iru hejmen Teĉjo, la familio atendas vin sobra. Ho, Dio mia, Dio mia ...

Mihail KOROTKOV



RIPPERDA

Ĝui la silenton

En Finnlando estas kutimo somere vizitadi preĝejojn. Ili estas malfermitaj ĉiutage, kun deĵoranta volontulo preta rakonti senkoste pri la historio kaj arkitekturo de la loko. Vojaĝantoj tie ripozas en kvieto kaj trankvilo: unuj envenas pro scivolo aŭ kaprico, aliaj pro deziro revidi la sanktejon. Trafiksignoj kun la vorto *Tiekirkko* (vojkirko) invitas al tiuspecaj vidindaĵoj. La vizito povas esti ne nepre religia.

Post dudek-jara laborado libervola oni finkonstruis vizitindan malgrandan kapelon ekumenan en la arbareca parto de la finna urbo Virrat. Ĉi-jare ĝin vizitis jam pli ol 100 000 personoj, inter kiuj estis eĉ turistoj el Azio kaj Ameriko. La kapelo estis konstruita el sveda ŝtalo, finnaj granito, pina kaj picea ligno. Ĝi situas sur privata tereno, apud bieno de familio, en kiu ekestis la ideo pri ĝia konstruado. Lokanoj, eksterlandanoj kaj EU finance helpis. La plej grava kontribuo tamen estis la senlaca fizika laboro kaj entuziasmo de loĝantoj de la ĉirkaŭaĵo.

Trankvilo kaj malstreĉiĝo

Kiam vizitantoj alvenas, ili tuj sentas la trankvilon kaj malstreĉiĝon, kaŭzitajn de la bela naturo. En la kapelo mem la altaron anstataŭas fenestregio, tra kiu oni vidas verdblankajn betulojn kaj bluan lagon. La koloroj ŝanĝiĝas laŭsezono. La spirhaltiga natura vidaĵo igas la preĝejon taŭga por ĉies



meditado kaj memorigas pri tio, ke niaj praavoj adoris la naturon.

La akustiko de la kapelo estas tre bona. Tial tie ŝatas prezenti sian arton muzikistoj kaj poemdeklamantoj. La benkoj sufiĉas por kvardeko da ĉeestantoj. Ĉi tie okazas familiaj festoj, baptadoj, nuptoj, kunvenoj kaj kursetoj.

Buspleno da turistoj povas inkludigi la kapelon en sian itineron. Per publikaj veturiloj oni ne povas atingi la sanktejon, ĝi foras dudekon da kilometroj de la urbocentro. Kaj ĝuste tial ĝi refreŝigas kaj ripozigas la animon de vizitantoj en preskaŭ sovaĝeja etoso. „Perceptu la silenton!” sonas la invito de la Matias-kapelo. Informoj en la finna, sveda, germana kaj angla ĉe www.matias-kappeli.net.

Saliko

Verdigu la dezertojn!

La homaro eligas tro multe da tiel nomataj varmodomaj gasoj en la atmosferon, precipe karbondioksido (CO_2), per bruligado de karbo, nafto kaj tergaso. Ili minacas trovarmigi la klimaton. Vico da konferencoj ĝis nun ne atingis konkretajn rezoluciojn pri drasta kaj deviga CO_2 -ŝparado (vidu la antaŭan numeron). Teknike ĝi estas farebla, kvankam ĝi postulas abundon da inventoj kaj novigaĵoj. Neniu unuopa el la agoj ĝis nun elpensitaj aŭ aplikataj estas sufiĉa. Ni bezonas pli aŭ malpli ĉiujn. Konsiderendaj estas ŝparado de energio, plibonigo de energiefikeco, uzado de senkarbonaj teknikoj kaj utiligo de CO_2 -malfontoj. Por ekonomia uzo de la mono necesas saĝa elekto de la metodoj.

Izolado

Ĉe la unua punkto, grandaj ŝancoj kuŝas en varmoizolado de domoj. En

Germanio ĝi povas ŝpari proksimume duonon de la hejtenergio, kiu nun respondecas pri 39 % de la tuta energikonsumo (loĝdomoj pri 28 %). La ŝtato instigas tiajn klopodojn per subvencioj. Tamen, plukalkulante la nunan malrapidan progreson, oni atingos la celon nur post multe pli ol cent jaroj, ĉar renovigado de domoj estas ne ofte farata kaj necesigas grandajn investojn. Pli grandajn ŝancojn havas landoj ekzemple en orienta Eŭropo, kie ĝis nun la domoj estas malpli bone izolitaj. Per la sama metodo estas ŝparebla energio por malvarmigo en landoj (ekzemple Usono), kiuj bezonas ĝin.

Multaj industriaj landoj instigas evoluigon de aŭtoj kun malalta konsumo. Sed iaj ajn plibonigoj estos grandparte „formanĝitaj” de la kresko de la trafiko. Pli bonan efikecon ankaŭ povus havi elektroaŭto, speciale estontece, se elek-

troproduktado estos CO_2 -ŝparema. Sed ili taŭgas praktike nur por mallongaj distancoj. Ĉe lumigo oni tuj povas ŝanĝi malnovajn lampojn per multe pli efikaj. Sed tio koncernas nur malmultajn elcentojn de la energikonsumado.

Akraj disputoj

Granda progreso rezultis en la pasintaj jardekoj en elektrocentraloj surbaze de gaso kaj karbo; speciale oni pli kaj pli uzas ankaŭ la varmon, kiu kromrezultas ĉe elektroproduktado. Tamen estas akraj disputoj, ĉu oni entute konstruu novajn centralojn uzantajn fosiliajn brulaĵojn. Kiel ajn, estas evidente, ke nur per plibonigo de efikeco kaj ŝparado oni ne povas atingi dekonon de la CO_2 -eligo, kio devus esti atingita ĝis la fino de la jarcento por limigi la plivarmiĝon al du gradoj celsiaj (vidu la antaŭan numeron).

Ĉe produktado de elektro, la atom-



Multaj sekaj regionoj ricevas sufiĉe da pluvo por spontanea kresko de kelkaj plantoj. Akvokonservantaj materialoj en la grundo faciligus tion. La bildo estas el la Kalaharo-stepo, suda Afriko.

energio ne liberigas CO₂. Ĝi estas tre potenca kaj preskaŭ ne elĉerpebla. Sed ĝi estas timata en Germanio, Usono kaj aliaj landoj pli ol la klimata problemo. La Germana Fizikista Asocio substrekas, ke sen ĝia almenaŭ dumtempa uzado oni ne povas funde kontraŭagi la varmiĝon. La teknikaj problemoj aŭ jam estas aŭ ankoraŭ povas esti solvitaj. Grandan sukceson rikoltas en Germanio kaj aliaj landoj la multigo de ventoturbinoj, kiuj nun jam produktas respektindan parton de la elektro. En aliaj landoj oni ankaŭ povas pliigi akvoelektrajn centralojn. En Germanio la fotoelektra sunenergio rapide kreskas, ĉar ĝi estas multe subvenciata. Pro la altaj kostoj tio estas ofte kritikata: Ĉu oni ne uzu la monon pli efike por alia metodo? Sed la kostoj rapide malkreskas kaj estas esperoj, ke post malmultaj jaroj la sunelekto estos ekonomia.

Privataj kompanioj

Pli proksime al ekonomieco estas la tiel nomata „fototerma” elektro, ĉe kiu

oni fokusas la sunradiojn per parabolaj kanaloj, hejtante oleon en tubo, kiu siaflanke funkciigas termoelektran centralon; la varmo povas esti konservata dum nokto. Tiaspecaj provaj centraloj ekzistas en Hispanio kaj Usono, kaj oni ĵus komencis konstrui novan tre grandan (1500 MW) en la dezerto Mohave ne tre malproksime de Losanĝeleso. Nun privataj kompanioj, per iniciato de Munkena Reasekuro (*Münchener Rück*, kiu asekuras asekurkompaniojn kontraŭ plej grandaj riskoj speciale pro naturkatastrofoj), planas grandegan reton de tiaj centraloj en norda Afriko kaj arabaj landoj, kun kapacito sufiĉa por iam provizi ĉirkaŭ sesonon de la elektro konsumota en Eŭropo, aldone al la lokaj bezonoj.

Multaj homoj, inkluzive iujn en la germana registaro, pensas, ke la energio de postkreskantaj materialoj estas CO₂-neŭtrala. Ili diras, ke bruligado de ligno aŭ biogaso liberigas nur tiom da CO₂, kiom antaŭe estis fiksita de la planto. Tio estas sintrompo. Se oni volas bruligi pli multan lignon (kio estas

subtenata en Germanio), tio povus esti CO₂-neŭtrala nur, se oni ankaŭ kreskigas pli da ĝi (kio ne estas subtenata). Sed eĉ en tiu okazo la klimato povas malprofiti: Se en Eŭropo oni volas rikolti pli da ligno aŭ aliaj energiplantoj, oni bezonas sterkon, kaj sterkado liberigas N₂O, kies varmiga povo estas multe pli granda ol tiu de CO₂.

Ellavado de CO₂

Alia metodo, kiun kelkaj komunikiloj konsideras esperiga, estas la ellavado de CO₂ el fumgasoj de energicentraloj por ĝin likvigi sub premo kaj subterigi en profundajn (sal-)akvohavajn tavolojn. Sed tio ne estas realisma, ĉar la kvantoj estas simple tro grandaj, en Germanio preskaŭ unu miliono da tunoj ĉiutage. Transportante ilin per trajnoj anstataŭ per tuboduktoj, oni bezonus ĉiun tagon 300 grandajn ŝarĝotrajnojn.

Anstataŭ tia subterigo de CO₂, ĝia biologia fiksado estus multe pli efika, realisma kaj malmultekosta. Tion denove emfazis la Germana Kemiista Asocio



Eĉ en la plej sekaj dezertoj estas lokoj kun plantoj. Evidente ne ĉiam mankas akvo. La bildo de la Mortovaloj (Death valley), Usono.

en 2004, post unua propono de Gregg Marland (Usono) en 1988 kaj multaj publikigoj (ankaŭ de la Interregistara Komisiono pri Klimatoŝanĝiĝo de UN) en la intertempo. Tiu malfonto de CO₂ ankoraŭ ne estas sufiĉe atentata en la publikaj diskutoj kaj politiko. Ĉiun jaron multoblo de la homfarita CO₂ estas fiksata en formo de biomaso, ekzemple en arbaroj; la sama kvanto ankaŭ estas liberigata per malkombinado, ekzemple putrado, tiel ke ekestas senvaria stato. Sed se oni sukcesas grandskale etendi la arbarojn, oni eĉ povas malpliigi la

de Germanio de 357 000 km²). Ili argumentas, ke en la lastaj jardekoj simila areo iĝis ne fruktodona per senarbarigo en la tropikoj kaj per etendiĝo de dezertoj ekzemple en la Sahel-zono. Per detalaj supozoj, ili ankaŭ taksas kostojn de 1 ĝis 5 eŭroj por ĉiu tiel fiksita tuno de CO₂. Tiel ĝi kostas klare malpli multe ol unu tuno de eligaĵraĵo (10-13 eŭroj aktuale). Do la metodo estas ekonomia, se oni rajtas dekalkuli la fiksitan CO₂ de la pagenda eligaĵo. En tiu okazo industriaj landoj arbarigus dezertojn en pli malriĉaj landoj (aŭ almenaŭ pagos por ĝi). Tiel la

kostojn), kiu nuntempe estas kompoŝtata (dum kelkaj monatoj) aŭ konvertata al biogaso (dum kelkaj tagoj). Se oni varmigas la organik materialon kune kun akvo al 180 °C en premreagujo (simila al vaporkaldrono uzata en kuirejoj), sen bezoni eksteran energion ĝi estas konvertata dum unu horo al karbo. La aliaj elementoj (nitrogeno, fosforo, sulfuro ktp.) kaj mineraloj restas en la akvo kaj povas esti redonataj al la medio. La karbo estas fakte variaĵo, kiu ankoraŭ enhavas iom da oksigeno. Tial ĝi povas konservi akvon kaj mineralojn, kvankam ne tiel efike kiel la supersorbantoj, sed iom simile al torfo aŭ nigra tero, kiu estas konata kiel tre fruktodona grundo ekzemple en Ukrainio aŭ Brazilo. (Fakte la ekestoprocezoj estas la samaj, kvankam la teknika metodo estas multe pli rapida pro la alta temperaturo.) Ĝi ankaŭ estus taŭga pliboniganto de grundoj eĉ en relative sekaj aŭ karstiĝintaj regionoj.

Plej freŝdate du aŭtoroj (Markus Antonietti kaj Gerd Gleixner) atentigas pri alia eco: Tia karbo estas multe pli longeviva ol humo, kiun mikrobakterioj oksidas al CO₂ ene de 80-100 jaroj (en Germanio; en tropikoj pli rapide). Do se oni konvertus parton de la ligno (prefere nur la malaltvaloran) en novaj aŭ malnovaj arbaroj al tia karbo, oni pligrandigus la arbaran kapaciton por konservado de karbono aŭ fiksado de CO₂.

Laŭ mi ni tamen bezonos striktan energiŝparadon kaj grandskalan ŝanĝon al sen-CO₂-aj aŭ CO₂-neŭtralaj energifontoj, kvankam la verdigo de dezertoj povus laŭkalkule kapti la tutan karbon-dioksidon eligotan de la homaro; mi simple dubas, ĉu oni vere povas havebligi en mallonga tempo la grandajn necesajn areojn. Estas ankaŭ malesperige vidi, ke daŭris tre longe, de la unua publika atento pri la klimatoproblemo en la 1980aj jaroj ĝis konkretaj malgrandaj kaj nesufiĉaj agoj, la Kioto-protokolo de 1997 kaj ĝia efektivigo en 2005. La verdigo de dezertoj eĉ ankoraŭ ne ricevis publikan atenton, kvankam ĝi povus esti la plej potenca ago kontraŭ la klimatovarmiĝo.

Werner Fuss

La arbarigo daŭreme plibonigus la lokan mikroklimaton kaj la grundon. Pro tio la metodo ne deprenus iun areon uzatan por produkti nutraĵojn; kontraŭe, ĝi prezentus novajn tiajn eblojn kaj tial povus helpi nutri la kreskantan mondloĝantaron.

atmosferan CO₂-enhavon, ne nur bremsi ĝian kreskon. Oni ne nur kaptus la eligaĵojn de energicentraloj kaj eĉ povus konsideri pluan uzon de fosiliaj elektraj centraloj, domhejtado ktp. Preferata estas la arbarigo de duonsekaĵaj regionoj en la subtropikoj kaj de dezertoj. En multaj tiaj regionoj pluvas almenaŭ unufoje ĉiun jaron.

Supersorbantoj

Se necese, oni povas plibonigi la grundon per supersorbantoj, t.e. materialoj, kiuj sorbas kaj konservas grandajn kvantojn de akvo kaj mineraloj. Ekzemploj de tiaj materialoj estas polielektrolitoj kiel salo de poliakrila acido (nun uzata ankaŭ en bebovinado) aŭ la responda amido; ili ankaŭ estas simple prepareblaj el rubaĵoj de plastaj materialoj. Sukcesaj tiaj plantejoj ekzistas en la suda Ĉinio, ŝtatoj ĉe la Persaraba Golfo, Israelo kaj aliaj landoj. La aŭtoroj de la studo de 2004, A. Hüttermann kaj J. O. Metzger, taksas, ke por fiksi la ĉiujaran eligaĵon dum almenaŭ la nuna jarcento (tiel haltigante la nunan koncentritecon) oni bezonas 4,8 (tropika sekregiona arbaro) ĝis 30 (dezerto) milionojn da kvadrataj kilometroj (Komparu la areon

granda minaco de klimatovarmiĝo povas esti konvertita al realigado de malnova revo de la homaro, verdigo de dezertoj.

La arbarigo daŭreme plibonigus la lokan mikroklimaton kaj la grundon. (La esprimo „mikro” ne misgvidu: tio koncernas grandegajn areojn.) Pro tio la metodo ne deprenus iun areon uzatan por produkti nutraĵojn; kontraŭe, kiel demonstrite en Israelo, ĝi prezentus novajn tiajn eblojn kaj tial povus helpi nutri la kreskantan mondloĝantaron. Ĝi ne nur subtenus la agrokulturon, sed ankaŭ la lokajn metiojn, ĉar ligno estas bona konstrumaterialo. Konsumante (espereble nur malgrandan) parton, oni povas uzi la lignon ankaŭ por gajni energion kaj produkti likvajn fuelojn aŭ aliajn kemiaĵojn. Tiel estus kreitaj altvaloraj laborebloj.

Biologia fiksado

Kontraste al aliaj provoj, la biologia fiksado de CO₂ povas esti teknike tuj komencita kaj grandskale realigata en kelkaj jardekoj, sen ia antaŭa esplorado. Tamen sciencistoj evoluigadas plibonigojn. Interesa metodo rezultis antaŭ nelonge el provo plirapidigi la procezaĵon de biorubaĵo (por ankaŭ malaltigi la


Ho, belaj spritaj tempoj!

La Cseh-metodo estis la patro de ĉiuj rektaj instrumentadoj, kaj la instruistoj, kiuj ĝin uzis, travojaĝis la tutan mondon, de Ferenc Szilágyi al Tiberiu Morariu, de E. L. M. Wensing al Margarete Saxl, de Julio Baghy al August Weide. Ĝuste la bildo de ĉi-lasta ornamas la kovrilpaĝon, montrantan karakterizan gestadon dum leciono. August Weide, germano edziĝinta al danino, kreis esperantistan familion kun du denaskuloj, kiuj siavice kreis familiojn kun denaskuloj, do prave la kovrilo omaĝas ĉi tiun valoran instruiston, kiu, tiam 76-jara, ankoraŭ gvidis kurson laŭ la Cseh-metodo dum la UK en Stokholmo en 1980.

Andreo Cseh (ofte esperantigita per „Ĉe“, laŭ la elparolo; 1895[1910]-1979) estis hungardevena rumano, pastro, kiu post diverslanda vagado por instrui Esperanton, establiĝis en Nederlando. En 1930 li tie fondis kun gesinjoroj Isbrücker la Cseh-Instituton de Esperanto (poste: Internacia Esperanto-Instituto), kaj du jarojn poste fondis kaj longtempe redaktis la revuon *La Praktiko* (aperinta ĝis 1970); en 1942 sub la germana okupado li kunfondis la mondfederisman organizaĵon *Universala Ligo* (aktiva ĝis 1993). Lia instrumentado estis karakteriza, kun uzo nek de lernolibro nek de nacia lingvo.

479 vortoj

Siajn lecionojn Andreo Cseh nomis *konversacioj* kaj li publikigis en 1930 47-paĝan broŝureton kun 479 vortoj sub la nomo *Konversacia vortaro*. Temis pri difinoj spritaj, ĉefe sugestitaj de la lernantoj mem. En la antaŭparolo de la



tiam eldono li skribis: „En la esperantaj konversacioj la gelernantoj ofte aŭdis la demandon: *Kion signifas tiu vorto?* Ĉar mi ne komprenas la naciajn lingvojn, ili devis doni la respondojn en Esperanto. En tiuj gravaj momentoj naskiĝis la difinoj kaj klarigoj, kiujn entenas ĉi tiu libreto.”

La dua eldono sekvis ĉirkaŭ du jarojn poste, sen ŝanĝoj; post la milito la situacio de Cseh iĝis malfacila, kaj aperis nur multobligitaj novaj eldonoj kun etaj modifoj. Cseh mortis en 1979 kaj nur en 1997 lia posteulino Mila van der Horst elpaŝis kun efektive nova eldono, la 5a, kunlabore kun Atilio Orellana Rojas.

Redakto de Borsboom

La freŝe aperinta 6a eldono estas komplete reviziita tra la redakto de Ed Borsboom, siavice aŭtoro de du belaj libroj, *Vortoj de Andreo Cseh* kaj *Vivo de Andreo Cseh* (ambaŭ aperintaj en 2003 ĉe Internacia Esperanto-Instituto); sed restis plene gardita la spirito de la Cseh-instruado. Aperas bildoj (desegnitaj de Jesse van Deijl) sur la maldekstra paĝo, responde al difinoj sur la dekstra. El la bildoj okulumas la esperanta kul-

turo, kun la *Rankvarteto* de Baghy kaj *El la Verda Biblio* de Lejzerowicz. Estis aldonitaj ĉirkaŭ 150 novaj vortoj, kiuj fariĝis bazaj en la nuntempa lingvo. La mastrumado de la artikolo, kiun Cseh ofte malzorgis, lasante al la lernantoj la uzadon laŭ ĉies propra lingvo, estas iom homogenigita. Iuj difinoj estas modifitaj aŭ aktualigitaj (ekzemple, „Azio” ne estas plu „la plej granda flava mondparto” sed ja „la plej granda mondparto”).

Jen specimeno de difinoj: „diskuto” – homoj parolas pri objekto, kiun ili ne konas; „kantas” – faras muzikon per la buŝo; „mateno” – la tempo, kiam infanoj iras en lernejon kaj redaktoroj iras hejmen; „nubo” – la griza vesto de la ĉielo; „okcidento” – tie malaperas la suno; „songas” – en dormo vidas bildojn; „suno” – la taga varma lampo de la naturo; „ŝranko” – ĉambro en ĉambro; „televidilo” – aparato, kiu montras skandalojn; „tuŝas” – inter la mano kaj la objekto ne estas loko; „vidas” – bildoj venas en la kapon.

Evidentas do, ke la „konversacioj” de Cseh estis gajaj, spritaj, kaj ke la lernantoj estis forte envolvitaj ne nur en la lernado, sed ja en la reciproka instruado de la lingvo. Nuntempe aliaj metodoj de instruado, ekzemple la interretaj, preskaŭ nuligis ĉi tiun vivantan partoprenon, sed ĝi ankoraŭ nun perdis neniom el sia freŝeco.

Carlo MINNAJA

Andreo Cseh: *Konversacia vortaro*. Eld. Internacia Esperanto-Instituto, Hago, 2010. 112 broŝuritaj paĝoj.

Prezo ĉe FEL: 13 eŭroj + afanko.

Noto de la redaktoro. En la 60aj kaj komence de la 70aj jaroj, kiam en Sovet-Unio mankis Esperanto-lernolibroj, mi, miaj lernintoj kaj iliaj lernintoj amase instruis per Cseh-metodo. Rezultoj estis frappe sukcesaj. En la jaro 1963a, dum la 48a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio, mi staris apud la pordo de la ĉambro, kie devis okazi Cseh-seminario, por ekvidi la alvenantan instruiston. Monon por pripagi partoprenon en la seminario, mi, bedaŭrinde, ne havis. Kompreneble, mi rakontis pri Andreo Cseh kaj pri la Cseh-metodo en mia libro *Vojaĝo en Esperanto-lando*.

Vagadoj urbaj kaj mensaj

Eble vi legas ĉi tiun recenzon pri la novelo „Kiel vaglumo” de Willem Elsschot, ĉar vi vidis atentokaptan anoncon en la decembra numero de MONATO. La anonco promesas plurtavolan legaĵon, kiun oni povas malĉifri diversmaniere. Kiel ni rakontu pri ĝi, ne rom-pante la enigmon?

La leganton, tenantan la libron en la manoj, atendas nova elprovo: li trovas sufiĉe detalan enkondukon de Eric Rinckhout en la nederlanda lingvo kaj en Esperanto. Ĉu legi ĝin antaŭ la novelo kaj tuj ekkoni ĉefajn turnojn aŭ prokrasti la sugestojn ĝis la fino de la legado? Krom diversaj klarigoj, la enkonduko donas utilan informon pri la aŭtoro, fama flandra verkisto, kies vera

nomo estas Alfons de Ridder (1882-1960).

Ni ne konsilas la libron al tiuj, kiuj ŝatas klaran rakontaĵon, aventurojn, ĝojan atmosferon. La novelo legiĝas malfacile pluraspekte: lingve, komprene, humore. Tamen ĝi havas multajn aludojn, vekas pensojn, faras demandojn kaj devigas serĉi respondojn.

La novelo mem estas tre mallonga, nur 35 paĝoj, kaj la historio estas tre simpla. Unu pluvan malserenan vesperon triopo de brunhaŭtaj maristoj akompanataj de loka loĝanto Laarmans, serĉas en Antverpeno unu virinon laŭ la adreso sur cigaredskatolo. Estas tre malmulte da aliaj agantoj, sed multe da pensoj, komparoj, rememoroj, re-

voj, provoj kompreni sin mem kaj siajn zorgatojn fare de Laarmans. La renkonto kun orientuloj pensigas lin pri familia vivo, pri amataj virinoj, pri rilatoj inter homoj, pri religioj kaj soci-aranĝo, ĉu aferoj estas realaj aŭ imagaj, ĉu ili estas gravaj aŭ ne.

La maldika libreto invitas al serioza pensado pri amo, vivo, socio. Pretaj sekvi mensajn vagadojn de la protagonisto legu „Kiel vaglumo”.

Anna kaj Mati PENTUS

Willem Elsschot: *Kiel vaglumo*. El la nederlanda tradukis Bert Boon. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2010. 56 paĝoj binditaj. ISBN 978-90-77066-45-4.

Prezo ĉe FEL: 10,00 eŭro + aŭfranko.



Kiel Vaglumo

Willem Elsschot

Antaŭ 50 jaroj mortis Willem Elsschot, unu el la plej famaj flandraj verkistoj de la pasinta jarcento. Okaze de tiu jubileo, Flandra Esperanto-Ligo eldonis la verkon “Kiel Vaglumo” (Het dwaallicht) en traduko de Bert Boon.

“Kiel Vaglumo” estas aspekte maldika libro 56-paĝa, sed enhave ĝi estas novelo plurtavola ... La tavoloj sin kaŝas, ĝis la leganto atingas iun tavoloŝlosilon, kiun li nur per tre atenta legado malkovros.

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 56 paĝoj,

ISBN: 978-90-77066-45-4;

prezo ĉe FEL: 10,00 EUR + aŭfranko.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be



**La libroj kaj
diskoj recenzitaj
en MONATO
estas mendeblaj
de la Retbutiko
de FEL**

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.

Desegnu por mi ŝafeton

La *Eta Princo* (france *Le Petit Prince*) estas, certe, la plej konata romano de la franca aviadisto kaj verkisto Antoine de Saint-Exupéry kaj unu el la plej vendataj libroj iam ajn. Laŭtakse preskaŭ 100 milionoj da ekzempleroj estis distribuitaj, kaj pluraj versioj de la verko enhavas desegnaĵojn, faritajn de la aŭtoro mem. La romano inspiris eĉ kantistojn, kiel Mylène Farmer, kiu en la jaro 2000 vekis grandan atenton per sia *Dessine-moi un mouton* laŭ la fama eldiro de la eta princo komence de la libro: „Desegnu por mi ŝafeton”.

La verko entuziasmigis ankaŭ tradukistojn. Pli ol 200 diverslingvaj versioj estis eldonitaj. Unu el tiuj estas la esperantlingva traduko de Pierre Delaire. Ĝi aperis unue en 1961 en Orleano (Francio) kun nigrablankaj ilustraĵoj kaj poste, plenkoloro, en 1984 en Montrealo (Kanado), funde reviziita de Delaire mem. Baldaŭ, tamen, tiu dua eldono elĉerpiĝis kaj *La Eta Princo* iĝis unu el

la plej multe serĉataj verkoj.

Finfine nun, en la pasintjara junio, aperis la tria esperanta eldono, kun traduko denove reviziita fare de internacia skipo sub la gvidado de Francisko Lorrain kaj eldonita de Kanada Esperanto-Asocio kaj Espéranto-France. La traduko estas flua, belstila, senriproĉa. La libro, fortike bindita, presita sur luksa papero kaj kompostita en tre agrablaj tiparoj, instigas al plia legado kaj foliumado.

„*La Eta Princo* estas plena de eternaj valoroj” diras la dorsa kovrilo. Tiujn eternajn valorojn oni nepre havigu al si: belega (re)eldono de grandioza verko!

pp

Antoine de Saint-Exupéry: *La Eta Princo*. El la franca tradukis Pierre Delaire; lingve reviziis Francisko Lorrain, Marc Bavant, Davor Klobučar, Donald Broadribb kaj Simon Davies. Eld. Kanada Esperanto-Asocio kaj Espéranto-France, 2010. 94 paĝoj, fortike bindita. ISBN 978-2-9507376-5-6.

Prezo ĉe FEL: 12,00 eŭroj + aŭfranko



Senmita biografio de Zamenhof

Estimataj, se, leginte la *Biografian Skizon* de Al. Korĵenkov pri Zamenhof, Donald Broadribb komprenis interalie (MONATO 2011/2, p. 24) ke „Ludoviko kaj Lazaro estas respektive la germana kaj la greka formoj de unusama nomo”, ke Zamenhof ne estis polo tial, ke „la moderna Pollando estis parto de Rusio, do oficiale li estis ruso”, kaj ke „en la frua vortuzo de Zamenhof mem, lia nacio estis ... judismo”, mi povas konkludi nur, ke la ideo-fluo inter aŭtoro kaj recenzinto grave paneis. Ĉar nek Korĵenkov, se juĝi laŭ lia interesege kaj samtema, sed kvinfoje pli ampleksa *Homarano*, povis diri tiajn stultaĵojn, nek Broadribb, se juĝi laŭ liaj aliaj kontribuoj al MONATO, estas homo stulta aŭ freneza, mi devas konjekti, ke la recenzata *Skizo* (kiun mi mem ne jam

vidis) estas iom tro skiza kaj tial eble erariga. Tamen, ĉar leganto tute senscia pri tiuj aferoj eble povus konfuziĝi, ne estas senutile indiki ĉi tie, ke:

1. La antaŭnomo de Zamenhof estis Lazaro. Pli ĝuste, laŭ lia naskiĝ-atesto ĝi estis Lejzer (transskribo de jida formo) kaj laŭ aliaj oficialaj dokumentoj ruslingvaj Lazarj. *Ludoviko* estas alia antaŭnomo, kiun li uzis (en la pola formo Ludwik), same kiel multaj Moŝeoj kaj Abrahamoj fariĝis Maurice-oj kaj Albertoj „en la mondo”, sed ĝi ne estis oficiala. La sola rilato inter la du nomoj estas, ke ili komenciĝas per la sama litero (por ke oni povu subskribi „L. Zamenhof”, ne bezonante memori, kiun nomon oni uzas en la koncerna medio).

2. Oficiale, Zamenhof estis **rus-**

landano, t.e. ŝtatano de Ruslando kaj subulo de la caro. Tio ne signifas, ke samtempe li ne estis polo, litovo, ĉeĉeno aŭ kartvelo. Ke li ne konsideris sin polo, tion oni povas apogi per aliaj argumentoj, kaj plej konvinke per lia propra kortuŝa deklaro antaŭ la krakova UK –, sed ne per argumentoj pri ŝtataj limoj!

3. Zamenhof ĉiam sin nomis „ruslanda hebreo” kaj ĉiam sin alkalkulis laŭ deveno al „la hebrea popolo/gento/nacio”. La formon „jud-” li preskaŭ neniam uzis, ĉar en la tiama rusa ĝi havis malŝatan nuancon; kaj li certe neniam nomis sian genton „judismo”, kio povis signifi nur judan religion aŭ doktrinon, do ĝuste tion, kion li **ne** kundividis kun siaj samgentanoj!

Angelos TSIRIMOKOS



La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko. La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio. Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. www.retbuto.net retbutiko@fel.esperanto.be
Prezo ĉe FEL: 24 € + afanko (papera versio), 14,40 € (ePub, Mobi, PDF)

Labirinto en ĉina loĝkvartalo

Mi veturis per vagonaro kun mia amiko Mario De Menezes, vic-konsulo de Brazilo en Germanio. Ni ĉeestis en la festo, okaze de la sepdekjara jubileo de nia amiko Kanjo



JOHN MORGAN

Kanev – prezidanto de Esperanto-societo en urbo Galabovo. La vagonaro veturis, kaj ni konversaciis. Pli ĝuste Mario parolis – mi aŭskultis. Li rakontis pri la landoj, en kiuj li estis konsulo – Japanio, Germanio, Nikaragvo. Kun intereso mi aŭskultis lin kaj imagis tiujn ekzotikajn forajn landojn.

– Mi estis en diversaj landoj kaj spertis neordinarajn travivaĵojn – rakontis Mario – sed iam en mia vivo mi travivis teruron. Tio okazis en Ĉinio.

Mario eksilentis, kvazaŭ li enpensiĝus aŭ eble li denove eksentus la teruron, pri kiu li deziris rakonti.

La vagonaro veturis tra arbaro. La arboj estis maldikaj, altaj, klinitaj verŝajne pro la ventoj, sed iliaj branĉoj estis enplektitaj. Nun, aŭtune, la branĉoj estis nudaj, sen folioj, kaj similis al homaj brakoj, tenantaj forte unu la alian. La arbotrunkoj ne estis grandaj, sed la branĉoj estis longaj kaj tiel forte enplektitaj, kvazaŭ ili tenus sin kaj kontraŭstarus al la ventoj. Mario same rigardis tra la fenestro. Unuan fojon li estis en Bulgario, kaj ĉio ĉi tie vekis lian intereson. Mi ne sciis, pri kio li meditis en tiu momento, sed lia vizaĝo esprimis scivolemon kiel ĉe infanoj. Laŭ mi Mario aspektis iom strange. Malalta, li similis al knabo, malgraŭ ke li estis preskaŭ sepdekjara. Lia vizaĝo brunis, vizaĝo de mulato, kaj en liaj nigraj brilaj okuloj ludis flametoj.

– Ĉinio estas neordinara lando – daŭrigis Mario kaj alrigardis min per siaj varmaj bonaj okuloj. – Mi gastis ĉe mia amiko Li Ŝen en Tan Sen, urbo proksima al Pekino. Ni, la esperantistoj, havas multajn amikojn en la tuta mondo. Li Ŝen renkontis min, kaj per taksio ni veturis al

lia hejmo en malproksima loĝkvartalo. Unuan fojon en la vivo mi vidis similan loĝkvartalon.

La taksio haltis antaŭ granda pordo. Li Ŝen malfermis la pordon, kaj ni eniris vastan korton. De placo proksime al la pordo komenciĝis multaj stratoj, kaj sur la du flankoj de la stratoj viciĝis dometoj, kiuj similis unu al alia kiel ĝemeloj. Ni ekiris laŭ unu el la stratoj kaj post cent aŭ ducent metroj ekstaris antaŭ la domo de Li Ŝen. Ni eniris. La edzino kaj du filinoj de mia amiko bonvenigis min kore kaj afable. La edzino tuj preparis teon, kaj mi kun Li Ŝen eniris etan ĉambron kaj komencis konversacii. Ni parolis pri Brazilo, Ĉinio, Esperanto, pri niaj amikoj el diversaj landoj. Mi rakontis pri miaj multnombraj veturadoj. Li Ŝen estis instruisto pri historio kaj detale klarigis al mi la historion de Ĉinio. Mi ne eksentis, kiam komencis vesperiĝi. Mi devis reveni en la hotelon. Li Ŝen akompanis min al la granda pordo ĝis la ĉefa strato kaj haltigis taksion. Ni adiaŭis unu la alian, kaj mi eniris la taksion. Eble mi veturis unu aŭ du kilometrojn kaj subite konstatis, ke mi estis forgesinta mian tekono en la domo de Li Ŝen. Mi portis valizeton kaj tekono, sed evidentiĝis, ke la tekono mi forgesis. Mi petis la ŝoforon, ke ni revenu. Li revenigis la taksion kaj lasis min antaŭ la granda pordo.

Mi eliris el la aŭto, malfermis la pordon kaj eniris la vastan korton. Jam tute vesperiĝis. Mi ĉirkaŭrigardis kaj hezitis, sur kiun straton mi ekiru por atingi la domon de Li Ŝen. Nenie videblis homo. Kelkajn minutojn mi staris, finfine elektis unu el la stratoj kaj ekiris. Mi iris kaj



ĉirkaŭrigardis. Ĉiuj domoj estis ege similaj, kaj mi ne rekonis la domon de mia amiko. Antaŭ dometo mi haltis, rigardis, meditis, kaj mi provis diveni, ĉu ĝi estas la loĝejo de Li Ŝen. Mi provis rememori iun detalon, kiun eble mi rimarkis, kiam mi estis ĉi tie kun Li Ŝen, sed vane. Neniam en mia vivo mi vidis domojn tiel similajn unu al alia.

Iu domo ŝajnis al mi, ke estas la domo de Li Ŝen, kaj mi proksimiĝis al la pordo, sed antaŭ ol mi premis la butonon de la sonorilo, en la domo ekbojis hundo. Ne – diris mi – tio ne estas la loĝejo de mia amiko; li ne havis hundon. Mi daŭrigis laŭ la stratoj, kaj pli kaj pli mi konfuziĝis. Mi ne nur ne trovis la domon de Li Ŝen, sed jam ne povis eliri el tiu ĉi labirinto, kaj mi ne sciis kion fari. Nenie videblis homoj; estis kvazaŭ neniuj loĝus ĉi tie. Subite mi rimarkis homan silueton kaj ekiris al ĝi. Kiam mi proksimiĝis, mi vidis maljunulinon, kiun mi provis alparoli, salutis ŝin angle, sed ŝi ektimis kaj rapide kaŝis sin en iu el la domoj. Ŝi eĉ ne alrigardis min.

Mi restis sola sur la strato, senhelpa, senreviĝinta. Mi haltis por pripreni la situacion. De la vagado mi laciis, ŝvitis, kaj mia koro batis kiel la koro de timigita leporo. En tiu ĉi stranga ĉina loĝkvartalo kun sennombraj stratoj kaj dometoj, similaj unu al alia kiel du akvogutoj mi estis tute sola. La nokto

kvazaŭ iĝis pli obskura, kaj ŝajnis al mi, ke mi iras en inko, la aero mucidis kaj pezis. Ie-tie lumis palaj strataj lampoj, sed ili ne donis al mi esperon. Nevole mi turnis min, kaj teruro min obsedis. Kelkaj junuloj rapide proksimiĝis al mi. Tuj mi eksentis, ke okazos io malbona. Mi provis rapidigi miajn paŝojn, malgraŭ ke mi ne sciis, en kiun direkton mi iras. Preskaŭ mi ekkuris, sed la junuloj atingis min. Unu el ili montris tranĉilon, kiu ekbrilis kiel serpento ĉe la limona strata lumo. Eble la junuloj rimarkis, ke mi vagas sencele tra la stratoj, ke mi estas fremdulo, sola. Unu el la junuloj diris ion ĉine. Intuicie mi komprenis, ke li deziras mian monon. Tuj mi metis manon en la poŝon por elpreni mian monujon. Mi pretis doni ĉion al ili, kaj en ĉi terura momento mi ekdeziris nur, ke mia amiko, Li Ŝen, tuj venu ĉi tien. Profunde mi kredis, ke se li estas vera amiko, li nepre venos kaj savos min. Forte mi kredis je nia amikeco. Mi esperis, ke pensante, mi transdonos miajn pensojn al li kaj ĉi-momente li komprenos, ke mi estas en danĝero.

Kaj ho miraklo! Ĉe la fino de la strato aperis viro. La junuloj forkuris. La viro rapide proksimiĝis, kaj mi ne povis kredi, kion miaj okuloj vidas. Li estis Li Ŝen. Li vere eksentis, ke io terura okazas al mi, kaj li venis helpi min.

Eĉ hodiaŭ mi ne povas klarigi, kiel

mi sukcesis per la pensoj alvoki mian amikon helpi min en la danĝera terura momento.

Mario eksilentis kaj alrigardis eksteren tra la fenestro. Li verŝajne observis la enplektitajn branĉojn de la arboj, kiuj similis al homaj brakoj, tenante forte unu la alian por kontraŭstari al la ventoj kaj ŝtormoj.

Julian MODEST

MONATO en Facebook

Kiu anas en la socia retservo *Facebook* ekde nun povas senpage ricevi mallongajn informojn pri MONATO. Sufiĉas iri al la adreso eo-eo.facebook.com/revuo.Monato kaj alklaki supre la ligilon *Ŝati*. La mesaĝoj de MONATO ekde tiam aperos en via novaĵlisto.

pp

Skulptaĵoj kantataj

Londone, la 6an de decembro 2010 en la fama Tate-galerio, virino komencas kanti antaŭ monduma publiko. La aranĝo ŝajnas esti konata: malfermo de ekspozicio, ornamata de muziko komence, meze kaj fine. Iom dubige aspektas la „ensemble”. Temas nur pri sola persono sen akompanista partnero kun digna instrumento. En tiu ĉi loko oni atendus Steinway-pianon, ne platan keston kun laŭtparolilo. Kaj la muziko devus esti, laŭ la norma gusto de tia publiko, iu ĵaza peco aŭ popa furoraĵo. Sed oni aŭskultas atente kaj devote al senafekcie prezentata skota popolkanto en cetera preskaŭ tute malplena salono.

Prestiĝa premio

La ekstravaganca sceno baldaŭ klariĝas. Ne temas pri la inaŭgura muziko, sed jam pri la „ekspozicio” mem. Sendube, oni troviĝas en ekspoziciejo de bildoj kaj skulptaĵoj, kaj en tiu ĉi tago oni disdonas tie la tutlande plej prestiĝan premion por bildfaraj artistoj sub 50 jaroj. Sed ĉi-foje la ĵurio atribuas la premion, nomatan laŭ Vilhelmo Turner, fama angla pentristo (1775 - 1851), ne al bildoj aŭ skulptaĵoj, sed al kanto kaj

ĝia kantistino. Strange, povus pensi ordinarulo. Ekzistas multaj konkursoj por komponado kaj interpretado de muziko. Kial institucio, kiu elektas ekde 1984 „la plej bonan aktualan bildartaĵon”, honoras per la plej alte dotita (25 000 pundoj / preskaŭ 30 000 eŭroj) brita bildartpremio kantadon de popolkanto?

Sonskulptisto

La laŭdanto provas ekspliki la decidon: la ĵurio aparte aprezis „la intelektan kaj emocian esploradon de sono kaj spaco” kaj aldone klarigas la fonon de la premiata kantistino. Susan Philipsz, 45-jara, ne volas esti muzikistino. Ŝi komprenas sin „sonskulptisto”, kiu kantas sub pontoj kaj en vendejoj, kie la kantoj forflugas, reeĥas, multobliĝas, miksiĝas kun la bruo de la ĉirkaŭaĵo, kie – laŭ ŝi – „la sono kreas spacon en la spaco”. Ŝia materialo estas precipe popolkantoj el ŝia devenregiono Skotlando. Akompanas ŝin ordinaraj akordoj, generitaj en studio, konservataj ciferece, prezentataj laŭtparolile. Philipsz povis atentigi pri si per la prezentado de la nostalgia kanto *Lowlands* sub la pontoj de la rivero Clyde en Glasgovo. Tian

eventon la bildartistoj kaj la artentreprenistoj nomas – ne nur en anglalingvaj landoj – *performance*, etimologie ja ne pli ol „elformado”. En la sekvo oni invitis ŝin prezenti sin en renomaj muzeoj en Usono kaj Eŭropo kun la plej enspeziga sekvo por ŝi ĝis nun, la Turner-premio.

Apud laŭdadoj kaj himnaj eksplikoj de tiuj artkritikistoj, kiuj difinas la nuntempan arton, do tion, kion ili volas kompreni tia, leviĝas pli sobraj voĉoj, kiuj pridemandas la aktualan (bild-)arton kaj ties kreantojn. Ili konstataj, ke la proponoj por tiu konkurso entute estis mizeraj, ke la premion jam gajnis flagranta ampolo en malplena blanke farbita salono, ke jenaj ĵurianoj preferas „konceptan arton” al serioza metio, ke aktualaj ekspozicioj volonte prezentas malplenajn kadrojn, unukolorajn tolaĵojn, eĉ kolektojn el rubujoj. Pri la premiitino ili aldonas, ke ŝi ja ornamas sin per skota ekzotikeco, sed vivas en Berlino, kie, ironie, germanaj artistoj sopiras agnoskon en la pli monduma Londono. Kaj veraj muzikistoj ne hezitas juĝi, ke pecoj en tia banala prezentado neniam akirus ian konsiderindan muzikan premion. Germana radistacio ilustris sian nepre pozitivan raporton pri la premiado per simpla trivoĉa infankanono, kantita unufoje de Philipsz kaj muntita per komputilo. Tute senarta afero, sed tamen prezentata de la raportistino kvazaŭ mirinda produkto.

Manko de diferencigo

Ĉu eblas objektiva taksado de tiu ĉi Turner-premiodecido? Nuntempe ŝajnas manki en certa tavolo de la publiko la volo aŭ la kapablo al diferencigo, al disting(i)go. Tion oni aparte povas konstati en la medio de la bildartistoj, inter kiuj certe ĉiam ankoraŭ kelkaj disponas pri inventa kaj metia geniececo. Evidente la *Zeitgeist* („Spirito de la tempo”) ne elektas ilin. Sed tiu spirito ne estas mistera forto transe de la homa volo. Tre koneble ĝi emanis ekzemple el la ĵurio de la Turner-premio. Furoras en Germanio libro kun la titolo *Germanio forigas sin mem*. Ĉu estas aŭdace aserti, ke aktuale la bildarto forigas sin mem?

RÖSSLER Franz-Georg



Philipsz kantas kanone sub ponto.

anoncetoj

Survoje al la UK Kopenhago, de 18-23 julio 2011 la **Hamburga Somero (HoSo)** atendos vin en Germanio. Temo: "Hamburgo - mediprotekta ĉefurbo de Eŭropo 2011". Interrete www.esperanto-hamburg.de/hoso

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO sen-paga elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prele-ga programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knaipo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.interna-cia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzempler. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

Trevor Steele



**Flugi kun
kakatuoj**

Trevor Steele



**Flugi
kun
kakatuoj**

FEL

Estas la lastaj jardekoj de la 19-a jarcento, kaj eŭropaj potencoj ŝajne nehaltigeble kolonias aliajn kontinentojn. En la brita kolonio Okcidenta Aŭstralio blankaj setlantoj ignoras la rajtojn de la aborigenoj, murdas aŭ forĉasas ilin de la tradicia teritorio, aŭ permesas al ili resti kaj servi kiel senpagajn laboristojn sur nove kreitaj bienoj.

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio: formato 135 x 205 mm, 256 paĝoj,

ISBN: 978-90-77066-46-1; prezo ĉe FEL: 16,50 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 8,00 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be